

Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Oktobro 2002

73-a jaro, n-ro 10 (1168)

ISSN 1163.0442

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

MENSUEL/MONATA

<http://www.sat-esperanto.org/> *** **retadreso: satesper@noos.fr**



76-a KONGRESO DE S.A.T. ĈAŬDEFONO

(La Chaux-de-Fonds)

12-19.07.2003

*Pli da informoj aperos en novembra
Sennaciulo*



SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...



Karaj gekamaradoj, kiel vi povos konstati, en tiu ĉi numero la ĉefa kaj plej ampleksa teksto estas la de-

tala Raporto pri la laborkunsidoj en Alikanto. Bedaŭrinde, la eĥo en la salono estis tre forta kaj la magnetofona registraĵo estas malbona. Via redaktoro kaj lia helpantino, nia k-dino Graĵina, kiuj kompilis la tekston, havis tre gravajn problemojn por bone kompreni la intervenojn de kongresanoj en la salono. Povas esti ke io ne estis bone komprenita aŭ mankas en la teksto. Ni petas pardonon. Ja ni ambaŭ faris tiun ĉi laboron plej bone eble. Tamen ni esperas ke ne estos multe da mankoj kaj ke vi estos korekte informitaj pri ĉiuj temoj kiuj estis traktitaj. Dankante pro via komprenemo, plej kamaradece salutas vin, viaj

Graĵina kaj Kreŝo

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesper@noos.fr.

TTT-paĝoj:

<http://www.sat-esperanto.org>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registriilo. Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

*

Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER

Abonnement annuel/jara abono France 52€

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399

Limdato por ricevo de kontribuajoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

Korekto

En la adreso de nia nova hispana peranto okazis eraro. Jen la bona adreso :

Pedro A. Hernandez Ubeda
c/Sainz de Baranda, 44 - 3° D
ES-28009 Madrid

Viaj reagoj...

IEK 2002 en Loveno

Dankon al René Bouchet pro la ĉarma kaj trafa raporto kaj la belaj fotoj! Ankaŭ mi ĉeestis tiun aranĝon unuan fojon. Tamen pri unu punkto de lia raporto mi ne konsentas, nome la mencio de la OSIEK-premio, kiun li komentis jene : «*Post pluraj voĉdonadoj, ĝin finfine ricevis k-do Barkoviĉ.*» (Du vortojn mi grasigis.) Fakte okazis nur **du** voĉdonadoj. Por la kvin kandidatoj pri la premio la rezulto de la voĉdono estis jena :

Auld	14
Barkoviĉ	22
Berveling	8
Cherpillod	7
Mistretta	5

 Entute 56

Do, jam la unuan fojon Barkoviĉ ricevis la plej multajn voĉojn. Nur la fakto, ke li ne ricevis la absolutan plimulton, necesigis duan voĉdonadon. Ĝi havis jenan rezulton:

Auld : 22 Barkoviĉ: 34 (entute: 56)

Mi sentis la bezonon menci tiujn detalojn por tiuj homoj, kiuj ne ĉeestis la aranĝon.

Nora Caragea

Jam estas oktobro kaj pluraj el vi ne pagis ankoraŭ kotizon 2002! Ĉu forgeso?

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Clar)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

Protokolo de Laborkunsidoj en Alikanto

SOLENA MALFERMO

Marde, la 2-an de julio okazis solena malfermo de la 75-a kongreso de SAT en belega malnova kastelo. Prezidanto de la OKK, k-do **Marteno Bustin** salutis la kongresanojn, bonvenigante ilin al Alikanto kaj al nia 75-a kongreso. Samtempe li pardonpetis pro kelkaj mankoj kiujn la OKK pro manko de tempo kaj kelkaj aliaj problemoj ne sukcesis plenumi. Ĝenerala sekretario de SAT-PK, k-do **Barkoviĉ** invitas unue la preprezentantojn de LEA-oj saluti la kongreson. Nome de SAT-TEB (la Brita LEA) salutis la kongreson k-do **Arturo Prent**.

Nome de SAT-Amikaro (franclingvia LEA), salutis k-dino **Juliette Ternant**. Ŝi informas la kongreson pri la tre proksima kunlaboro inter SAT kaj SAT-Amikaro, kiuj dum pluraj jardekoj havis siajn respektivajn sidejojn en la sama lokalo en Parizo. Pro manko de spaco finfine SAT-Amikaro akiris novan belegan lokalon en la 13-a pariza distrikto. Ŝi invitas ĉiujn kiuj vizitos Parizon, viziti ankaŭ tiun novan lokalon kun granda montrofenestro kaj bone lokita ĉe la granda bulvarado. Same ŝi aludis pri la ekspozicio pri Historio de Laborista E-Movado, venigita el Franz-Hüser Instituto (Dortmund - DE), kiun prizorgis, kun gekamaradoj el la pariza SAT-rondo, nia karmemora k-do Ivo Peyraut. Fine ŝi salutis la kongreson nome de SAT-Amikaro. Propranome ŝi salutis la OKK-on pro la farita, farata kaj farota laboro. **K-do Bernabeu** klarigas, ke post la lasta kongreso de HALE li decidis ekŝigi el HALE. K-do Barkoviĉ esprimas deziron ke tiu problemo de HALE estu traktata dum la kunveno de LEA-Komitato. Nome de SLEA salutis la kongreson k-do **Pelle Persson**. Li konstatas kun bedaŭro ke la membroj de SAT estas pli kaj pli maljunaj kaj esperas ke tamen alvenos la junuloj kiuj povos daŭrigi la vivon de SAT.

Sekvas la salutoj de reprezentantoj de diversaj

landoj. Nome de aŭstraliaj SAT-anoj kaj de Aŭstralia E-Asocio salutis la kongreson k-do **Bernie Heinze**. Aktuale la aŭstralia registaro estas tre dekstra tiagrade ke li mem nuntempe hontas pri sia lando pro agado de tiu pres-

kaŭ faŝista registaro. K-do **Max Hollinger** salutis nome de aŭstraj esperantistoj dezirante sukceson al la kongreso. Nome de britaj esperantistoj kaj SAT-anoj salutis k-do **A. Prent**. K-do **Jakvo Schram**, kiu "ne kulpas esti belgo", tamen salutis la kongreson nome de belgaj federacioj. Li esprimas la esperon kaj konvinkon ke la novaj membroj alvenas kaj ke la estonto de SAT



Atendante la inaŭguron de la kongreso

Fotis : Gabalda

estas certa. K-dino **Liba Gabalda**, kiel origine Ĉeĥino, salutis la kongreson kaj deziras sukceson. S-ro **Jacques Morin** salutis persone kaj prezentas siajn aktivecojn por enkonduki Esperanton en ekologiajn mediojn. Li informas ke en la reto la Sendependa ekologia partio uzas ankaŭ Esperanton. El Italio salutis nia landa peranto, **Carlo Bourlot** kaj deziras sukceson al la kongreso. Ankaŭ li dankas al la OKK pro la farita laboro. Juna **Irananino** salutis la kongreson nome de iranaj esperantistoj, lando en kiu bedaŭrinde SAT ne havas membrojn. Nome de japanaj SAT-anoj kaj esperantistoj salutis k-do **Yamasaki Seikō**. Li informis la kongreson ke en aŭgusto okazos organiza kunsido en Japanio por fondi la japanan LEA-on. El Litovio salutis la kongreson nia landa perantino, k-dino **Grajina Opulskiene**, kiu deziras nome de litovaj SAT-anoj kaj ĝenerale esperantistoj sukceson en laboro kaj agrablajn kongresajn tagojn. K-dino **Corrie Kwantes**, nederlanda perantino salutis nome de nederlandaj SAT-anoj kaj esperantistoj. El Malgaŝio salutis k-dino **Lala** kiu ĝojas povi veni malgraŭ multaj malfacilaĵoj kaj deziras sukceson al la kongreso. K-dino **Zofia Banet Fornalowa**, esprimas la konvinkon pri la estonteco de SAT. La mondo estas en tia situacio ke la asocio kiel SAT estas